

La Bulteneto

Numero 74 - Esperantojaro 138



Nummer 74 - Jahr 2024

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



La Ŝvebanta Baleno
Vieno havas novan muzeon
Der schwebende Wal
im neuen Wien-Museum

La Bulteneto

Numero 74  Esperanto-jaro 138

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfingasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo

La Baleno ŝvebas en la ĵus renovigita Wien-Muzeo

Elparolo de Wien: [vin]

Fotoj sur paĝo 1, 3 sube kaj 19, 20: Walter Klag, 2023 12 07

Aliaj fotoj de Wien-Museum

Vieno havas novan muzeon



La muzeo 1959 (supre) kaj 2023 (sube)




Renovigita kaj pli ampleksa

Vere admirinda nova atrakcio vizitindas ekde la solena inaŭguro je la 6a de decembro 2023 en Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio: Ĝi nomiĝas nun „Vieno-Muzeo“. Post tri jaroj da fermo 2020 ĝis 2023 la iama „Historia Muzeo de Vieno“ denove akceptas vizitantojn.

La originala muzeo estis tri-etaĝa domo konstruita en la jaroj 1954 ĝis 1959 laŭ la koncepto de la arkitekto Oswald Haerdtl [hertl].

La nova koncepto de la arkitektoj Ferdinand Certov, Klaudia Ruck [ruk] kaj Roland Winkler celis ne nur al renovigado de la originala muzeo, sed ankaŭ al pliampleksigo. Ĉar la originala konstruaĵo ne permesis aldonitan ŝarĝon de du pliaj etaĝoj, la arkitekta teamo finfine kreis eksterordinaran planon.


La kvara kaj kvina etaĝoj, kiuj ricevis la moknomon „Matraco“ (vidu la foton sur la paĝo 3 sube), estas konstruitaj tute sendepende de la originala domo kvazaŭ kiel ŝelaĵo. Tiun novan parton subtenas fortikaj ŝtal-elementoj, kiuj fiksiĝis kiel propra fundamento en la grundo.




Supre la ștala platformo inter la 4a kaj la 5a etaĝo.
Oben die stählerne Plattform zwischen dem 4. und 5. Stock.



Dekstre la nova enireja halo.
Rechts die neue Eingangshalle.




Rigardo el la nova enireja halo de Vieno-Muzeo al Karlopreĝejo.
[Blick von der neuen Eingangshalle des Wien-Museums zur Karlskirche.](#)



Kafejo en la 4a etaĝo kun rigardo al la Viena urbocentro.
Café im vierten Stock mit Blick zur Wiener Innenstadt.

Österreichisches
Umweltzeichen
Grünes Museum



Aŭstria Medio-Signo - Verda Muzeo

Tiu signo estas aljuĝata por produktoj kaj entreprenoj, ekde 2018 ankaŭ por muzeoj la ekspozicioj, kiuj protektas nian vivmedion. La simbolo estas dezajnita de la arkitekto, artisto kaj mediprotekta pioniro Friedensreich [fridensrajĥ] Hundertwasser (1928 – 2000).

Samtempe kun la malfermo - post renovigo kaj pligrandigo - la Vieno-Muzeo ricevis la tiel nomatan Aŭstrian Medio-Signon.

La nova domo havas hejtadon kaj malvarmigadon pere de tervarmo; glacojn, kiuj aŭtomate malheliĝas; fotovoltaikan instalaĵon sur la tegmento kaj argilan pucon sur la ekstero de la muroj.

Temperaturo kaj aera humideco en la ekspoziciejo estas nun ne absolute fiksitaj, sed povas altiĝi aŭ malaltiĝi en bendlarĝo, kiu

konvenas al la muzeaj objektoj. Tiel la objektoj ne ruiniĝas kaj multe da energio ŝpariĝas.




Dum la alikonstruado.

Foto: 23. Mai 2021, Foto Erich J. Schimek / Initiative Denkmalschutz

La Ŝvebanta Baleno

Baleno estas mamulo. Tamen Vienanoj diras „Walfisch” [valfiŝ], do „balen-fiŝo”. Prater estas la amuzkvartalo de Vieno. Tie staris la restoracio „Zum Walfisch” „Al la Balen-Fiŝo”.




Vieno, Prater: La iama restoracio „Al la Balen-Fiŝo”.
Maldekstre tobogano.
Wien, Prater: Das ehemalige Restaurant „Zum Walfisch”.
Links Toboggan.



La baleno sur la restoracia tegmento.



Dekstre Maria Benke, la arkitektino de la baleno, kun kolego.
Foto el la 1950aj jaroj. Kopirajto familio Böhm.



La interna skeleto de la baleno estas el ligno, la haŭto el kupro.
La maso estas 1400 kg, la longeco 9,5 metroj kaj la alteco 3 metroj.

Nun, post la renovigado, la maso de la baleno estas 1700 kg.

Necesis aldoni interna strukturo por stabiligi la objekton.


Ekde la jaro 1951 la akvoŝprucanta baleno tronis sur la tegmento de la restoracio, kiu malkonstruiĝis 2011. La konstruisto Güner Ayaz [giner ajaz] ne ruinigis la beston, sed konservis ĝin sur deponejo.



La baleno sur la deponejo.
[Der Wal auf der Deponie.](#)



Transportado de la baleno al Vieno-Muzeo.
Transport des Wals zum Wien-Museum.





Okaze de la rekonstruado de Vieno-Muzeo:
Regula Künzli kun modelo de la ŝvebanta baleno.

Filmo:

<https://www.youtube.com/watch?v=zVhxpnsyaZU>

La baleno alvenas al Vieno-Muzeo kaj estas transportata al la planita pozicio en la centra halo kun ege granda peno kaj singardemo kaj uzado de diversaj transportiloj kaj leviloj.

La „Prater-Baleno” estas la unua objekto en la nova Vieno-Muzeo. Pli ol sesdek jarojn ĝi tronis sur la tegmento de la restoracio “Al la Balen-Fiŝo”. Danke al privata sava operacio la legenda maskoto eniris la kolekton de la Vieno-Muzeo. En la deponejo de la muzeo la baleno restaŭriĝis, la fera kadro kaj la ligna konstruo ene de la baleno estis plifortigita por la nova prezentado en la centra halo de Vieno-Muzeo. Dek metrojn longa, 1,7 tunojn peza – konstruteknike la alporto de la baleno en la muzeon kiel la unua objekto jam havis sencon. Danke al kompleksa statiko la baleno ŝvebas nun en la halo supre de la vizitantoj. En la filmo centraj aktoroj de la aŭdaca, sukcesa entrepreno rakontas pri statikaj kalkuloj, nova skeleto por la besto kaj ĝia „piĝamo” por la tempo ĝis la malfermo de la muzeo.

Unue la Baleno estis sennoma. Tial la urbo Vieno alvokis al voĉdono pri la nomo por la baleno per Instagramo. Disponeblaj por elekti estis la nomoj Otilie, Poldi, Walli, Valerie kaj Walburga.

Post trisemajna voĉdona tempo la rezulto estis klara je la 5a de januaro 2023. La baleno nun nomiĝas „Poldi”, karesa formo de „Leopoldo”.

Pli ol 60 jarojn la baleno tronis kiel maskoto sur la tegmento super la enirejo de la gastejo. Ĝi ŝprucigis akvofontanon, brilis nokte kaj

entuziasmigis junulojn kaj maljunulojn, longtempe ankrita en la kolektiva memoro de la viena loĝantaro.

Kiam la gastejo estis malkonstruita de la konstrua kaj malkonstrua firmao AYKA en la jaro 2013, la posedanto de tiu firmao, Güner Ayaz, savis la balenon kaj organizis transportadon al la tereno de sia firmao nur malmultajn kilometrojn sude de Vieno. Tie la baleno restis en stokeja halo. Konkretan planon, kio devus okazi al la metala-ligna „Baleno-Fiŝo”, Güner Ayaz ne havis.



Foto privata: Güner Ayaz savis la Balenon

En la jaro 2016 li ricevis telefonalkvokon el la buroo de la viena kultura konsilanto. Güner Ayaz decidis donaci la balenon, se ĝi venus al muzeo por ĝojigi multe da homoj.

Kiam la proksimume 10 metrojn longa, 3,5 metrojn alta kaj 1400 kilogramojn peza objekto estis alportita al Vieno Muzeo (vidu bildojn), ĝi estis tre veterdamaĝita. Restaŭristo Regula Künzli kaj ŝia teamo sukcesis renovigi la balenon tiel, ke la malnova patino ne perdiĝis.



Aktuale la baleno ŝvebas en la centra halego de la renovigita muzeo.

Derzeit schwebt der Wal in der zentralen Halle
des renovierten Museums.




Modelo de Vieno en la jaro 1400. Meze iom maldekstre la katedralo Sankta Stefano ankoraŭ sen la alta suda turo. Antaŭe la riverego Danubo, dekstre la iama haveno. Ĉirkaŭe la urba muro. La modeloj de la domoj estas faritaj pere de tridimensia printilo. La substanco estas bazita sur maizo.

Modell der Stadt Wien im Jahre 1400. Links von der Mitte der Stefansdom, noch ohne Hochturm.

Vorne die Donau, rechts der ehemalige Hafen.

Ringsum die Stadtmauer.

Die Hausmodelle wurden mit einem 3D-Drucker hergestellt. Sie bestehen aus einer Masse auf Mais-Basis.



Ŝtuparoj el la jaro 1959.
Stiegen aus dem Jahre 1959.

Bitte beachten Sie auch
die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag

Ora Ĵurnalo

Numero 55, Oktobro 2022



Fotita de Carina Torwald ĉe Björsbo ekster Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Tre leginda magazino el Svedio

LA MONO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO



Serio 1 + 5 + 10 Steloj, eldonita 1959, prezo de la serio 120 €.



50 Steloj Julia Isbrücker, eldonita 2020, prezo 89 €.



100 Steloj René de Saussure, eldonita 2018, prezo 89 €.

Sendokostoj 10 € por unu paketo. Validas por Eŭro-landoj.

Bonvole sendu vian mendon al esperanto@chello.at.



Die Münze Österreich AG
Wien 3., Am Heumarkt 1
Pregejo de la arĝentaj
100 Steloj kaj 50 Steloj

STELO-TABELO

Nominalo	Materialo	Maso	Dia- metro	Jaro	Eldon- kvanto	Prezo
1 Stelo	Bronzo	3,4 g	20 mm	1959 ¹	5000	40 €
5 Steloj	Latuno	5,0 g	23 mm	1959 ¹	5000	40 €
10 Steloj	Cu – Ni	9,0 g	28 mm	1959 ¹	5000	40 €
25 Steloj	Cu-Ni 75-25	19 g	37 mm	1965	1000	200 €
25 Steloj	Ag 900/1000	25 g	37 mm	1965	5000	200 €
25 Steloj	Au 983/1000	50 g	37 mm	1965	10	5000 €
1 Stelo	Plasto ruĝa	0,8 g	23 mm	2012	3000	1 €
3 Steloj	Plasto flava	0,9 g	25 mm	2012	3000	3 €
10 Steloj	Plasto verda	1,3 g	29 mm	2012	3000	10 €
100 Steloj	Ag 999/1000 ²	31,1 g 1 unco	37 mm	2018 ³	1000	89 €
50 Steloj	Ag 925/1000	30,0 g	40 mm	2020	300	89 €



Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.

Produktado de la 100- kaj 50-stela monero-medaloj: Münze Österreich.

Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgio.

Informo pri la aktualaj prezoj ĉe esperanto@chello.at. Kelkaj moneroj estas ne tuj livereblaj.

¹ Pregitaj en la jaro 1960

² La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.

³ Pregita en la jaro 2017

Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko” (EN), probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian **terminaron**.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum dek jaroj ĝis 167 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo en 45 landoj.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”). Krome la **NUR PERRETA** revuo estas tute **SENKOSTA**! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidus poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”



KONSTRUADO

kajero de TAKE 2021




Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

TAKE Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Retpoŝto al sekretario Pierre Grollemund:
verdapigo@gmail.com

Stefan Klag Walter Klag

SAT.IROJ



Dekoka kajero

Mendu la kajeron en formato pdf ĉe
esperanto@chello.at

EL SAT.IROJ 17

En frenezulejo

En frenezulejon estas transportitaj tri novaj uloj.

Ĉiuj scivolemas, kial ili estas enmetitaj.

La unua: "Pro tro granda bruoj. Ĉar mi dumnokte tro laŭte fermis la pordon de mia biciklo."

La dua: "Ĉar mi fumis en unudirekta strato."

La tria: "Mi estas la policisto, kiu arestis tiujn ambaŭ."

Trovis Alfred



“Cetere: Kiel fartas via frato?”

Esperanto en Vieno

Vizitu niajn renkontiĝojn en la hejmeca, tipe Viena kafejo AIDA en la naŭa distrikto, Währinger Straße 47.

La aktualajn informojn vi ricevas de
esperanto@chello.at



La kafejo AIDA

Haltejo Spitalgasse de la tramlinioj 5, 33, 37, 38, 40, 41 kaj 42



Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

Esperantokurse und Führungen auf Anfrage

Im selben Haus befindet sich auch die

Musikaliensammlung

und das

Globenmuseum